# INTER NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth, Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 212 — Decembro 2003

Laborantoj:





Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## JARFINA NOTO DE LA REDAKTORO

Kara leganto,

Mi multe esperas, ke vi ĝuis agrablan, prosperan kaj feliĉan jaron 2003.

Se vi regule legas ĉi tiun gazeteton, vi eble jam divenis la problemon, kiu kaŭzis la malfruiĝegon de ĉi tiu numero: mi serĉadas novan enhavon. ***Inter Ni*** ekzistas por oferti al vi, kara leganto, la oportunon por dividi kun ni viajn opiniojn kaj ideojn.

Mi deziras multe danki al ĉiuj el vi, kiuj jam partoprenis en tiu agado per viaj kontribuaĵoj. Dum la pasinta jaro ni aperigis multajn interesajn, eĉ aktualajn artikolojn. Sed, sen la daŭranta kunlaboro de vi ĉiuj, la sukceso de nia gazeteto ne ekzistas. Ĉi tiu numero estas la dua, kiu lastatempe malfruiĝegis pro manko de materialo, kaj mi jam denove demandis al mi mem, ĉu daŭrigi la aferon valoras la penon. Mi petas, ke vi mem faru novjaran decidon por kontribui al nia gazeteto, eĉ per vivosigno.

Mi ankaŭ memorigu, ke gravega parto de via ĉiujara subteno estas (re)abonado. Nia kasisto, Reni Porter, atendas vian abon-monon.

***Inter Ni*** ne estas aparte kristema, eĉ religiema gazeteto, sed oni jam rekomendis al mi, ke bone verkita kaj facile trovebla enhavo por nia gazeteto troviĝas en sanktaj skriboj kiel ***La Sankta Biblio***. Antaŭ pluraj jaroj ***Inter Ni*** jam citis la plej faman kristnaskan rakonton el „La Evangelio laŭ Sankta Luko." Ĉi-foje ni citas (sen vers-numeroj) la alian, pli raporteman version pri la eventoj ĉirkaŭ Kristnasko. Se vi havas rekomendojn pri aliaj sanktaj skriboj kiuj plaĉas al vi, mi petas, ke vi sendu al mi viajn rekomendojn.

Nia alia kontribuaĵo traktas pli kutiman aferon inter ni, la vintran nutradon de sovaĝaj birdoj. Ĉu ankaŭ vi malsovaĝigas nigrakapajn paruojn?

La redakcio de ***Inter Ni*** deziras al vi ĉion bonan por la jaro 2004.

— Bob Williamson



## KRISTNASKA RAPORTADO

laŭ ***La Evangelio laŭ SANKTA MATEO***

**Ĉapitro 1, versoj 17-25**

...Tial ĉiuj generacioj de Abraham ĝis David estas dek kvar generacioj, kaj de David ĝis la transloĝiĝo en Babelon dek kvar generacioj, kaj de la transloĝiĝo en Babelon ĝis la Kristo dek kvar generacioj.

Kaj la naskiĝo de Jesuo Kristo estis tiamaniere: kiam lia patrino Maria estis fianĉinigita al Jozef, antaŭ ol ili kunvenis, ŝi troviĝis graveda per la Sankta Spirito. Kaj ŝia edzo Jozef, estanta justulo, kaj ne volante meti ŝin al publika malhonoro, volis ŝin sekrete forsendi. Sed kiam li pripensis tion, jen anĝelo de la Eternulo aperis al li en sonĝo, dirante: Jozef, filo de David, ne timu preni al vi vian edzinon Maria; ĉar tio, kio naskiĝos de ŝi, estas per la Sankta Spirito. Kaj ŝi naskos filon; kaj vi nomos lin ***JESUO***; ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj. Kaj ĉio tio okazis, por ke plenumiĝu tio, kion la Eternulo parolis per la profeto, dirante:

> Jen virgulino gravediĝos kaj naskos filon,
>
> Kaj oni donos al li la nomon Emanuel;

tio estas, Dio kun ni. Kaj Jozef, leviĝinte el sia dormo, faris, kiel ordonis al li la anĝelo de la Eternulo, kaj prenis al si sian edzinon; kaj li ne ekkonis ŝin, ĝis ŝi naskis filon; kaj li donis al li la nomon ***JESUO***.

**Ĉapitro 2, versoj 1-23**

Kaj kiam Jesuo estis naskita en Bet-Leĥem de Judujo en la tempo de la reĝo Herodo, jen saĝuloj el la oriento venis al Jerusalem, dirante: Kie estas tiu, kiu estas naskita Reĝo de la Judoj? ĉar ni vidis lian stelon en la oriento, kaj venis, por adorkliniĝi al li. Kaj kiam la reĝo Herodo tion aŭdis, li maltrankviliĝis, kaj la tuta Jerusalem kun li. Kaj kunveniginte ĉiujn ĉefpastrojn kaj skribistojn de la popolo, li demandis al ili, kie la Kristo devas naskiĝi. Kaj ili diris al li: En Bet-Leĥem de Judujo, ĉar per la profeto estas skribite jene:

> Kaj vi, ho Bet-Leĥem, lando de Judujo,
>
> Neniel estas plej malgranda inter la regantoj de Judujo;
>
> Ĉar el vi venos reganto,
> Kiu paŝtos Mian popolon Izrael.

Tiam Herodo sekrete venigis la saĝulojn, kaj precize sciiĝis de ili pri la tempo, kiam aperis la stelo. Kaj li sendis ilin al Bet-Leĥem, dirante: Iru kaj elserĉu zorge pri la knabeto; kaj kiam vi lin trovos, sciigu al mi, por ke mi ankaŭ venu kaj adorkliniĝu al li. Kaj aŭdinte la reĝon, ili ekvojiris; kaj jen la stelo, kiun ili vidis en la oriento, antaŭiris ilin, ĝis ĝi venis kaj staris super la loko, kie estis la juna knabeto. Kaj vidante la stelon, ili ĝojis kun tre granda ĝojo.

Kaj veninte en la domon, ili vidis la knabeton kun lia patrino Maria, kaj adorkliniĝis al li; kaj malferminte siajn trezorojn, ili faligis sin kaj prezentis al li donacojn: oron kaj olibanon kaj mirhon. Kaj avertite de Dio en sonĝo, ke ili ne iru returne al Herodo, ili foriris per alia vojo al sia lando.

Kaj post ilia foriro jen anĝelo de la Eternulo aperis en sonĝo al Jozef, dirante: Leviĝu, kaj prenu la knabeton kaj lian patrinon, kaj forrapidu en Egiptujon, kaj restu tie, ĝis mi parolos al vi; ĉar Herodo serĉos la knabeton, por lin pereigi. Kaj li leviĝis, kaj prenis la knabeton kaj lian patrinon nokte, kaj migris en Egiptujon, kaj restis tie ĝis la morto de Herodo; por ke plenumiĝu tio, kion la Eternulo parolis per la profeto, dirante: El Egiptujo Mi vokis Mian filon.

Tiam Herodo, ekvidinte, ke li estas trompita de la saĝuloj, tre koleris; kaj sendinte, li mortigis ĉiujn knabojn en Bet-Leĥem kaj en ĉiuj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, havantajn du jarojn aŭ malpli, laŭ la tempo, pri kiu li precize sciiĝis de la saĝuloj. Tiam plenumiĝis tio, kio estis dirita per la profeto Jeremia, nome:

> Voĉo estas aŭdita en Rama,
>
> Ĝemado kaj maldolĉa plorado,
> Raĥel priploras siajn infanojn,
> Kaj ŝi ne volas konsoliĝi, ĉar ili forestas.

Sed kiam Herodo mortis, jen anĝelo de la Eternulo aperis en sonĝo al Jozef en Egiptujo, dirante: Leviĝu, kaj prenu la knabeton kaj lian patrinon, kaj iru en la landon de Izrael; ĉar mortis tiuj, kiuj atencis la vivon de la knabeto. Kaj li leviĝis, kaj prenis la knabeton kaj lian patrinon, kaj venis en la landon de Izrael. Sed kiam li aŭdis, ke Arĥelao reĝas en Judujo anstataŭ sia patro Herodo, li timis iri tien; kaj avertite de Dio en sonĝo, li fortiris sin en la regionojn de Galileo, kaj venis al kaj loĝis en urbo nomata Nazaret, por ke plenumiĝu tio, kio estis dirita per la profetoj, ke li estos nomata Nazaretano.

— el La Sankta Biblio: La Nova Testamento de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo (Brita kaj alilanda biblia societo, Londono, p.5-6)

**N.B. Oni ankaŭ facile povas legi la Biblion ĉe la retlokoj: <http://www.esperanto.nu/upsala/biblio/> kaj <http://www.site-berea.com/C/sb/index.html>.**

# NIGRAKAPAJ PARUOJ EN UPPER RAWDON



Tre plaĉas al mi la sovaĝaj birdoj, kaj mi nutras ilin dum la tuta jaro, sed precipe vintre, kiam la neĝo kovras la grundon. Mi pendigas du birdonutrujojn plenigitajn per nigraj sunflorsemoj kaj aliaj semoj, kiujn la birdetoj ŝatas. Ili flugas tien kaj reen dum la tuta tago. Estas interese rigardi ilin, kaj mi faras tion ĉefe por lerni pri birdoj sovaĝaj en mia regiono.

La nigrakapaj paruoj, bluaj garoloj, pegoj, diversaj specoj de paseroj kaj fringoj, mornaj kolomboj, eĉ korvoj kaj multaj aliaj flugas al la manĝujoj por manĝi. Sed la plej plaĉaj, laŭ mi, estas la nigrakapaj paruoj. Kelkaj el tiuj birdetoj nun estas preskaŭ malsovaĝaj, kaj mi eltrovis, ke ili ŝatas manĝi krudajn arakidojn. Mi metas tri aŭ kvar arakidojn sur mian manon kaj staras kviete, havante la brakon etendita. Ili flugas al mia mano unuope, sidas sur la mano, rigardas min per inteligentaj brilaj okuloj nigraj dum kelkaj sekundoj, prenas arakidon kaj forflugas. Estas tri aŭ kvar tiaj preskaŭ malsovaĝaj birdoj, kaj ili pli kuraĝigas lastatempe kaj ĉirkaŭflugas mian kapon kiam mi eliras la domon, kvazaŭ dirante „Donu al mi arakidon, mi petas." Ili eĉ sidas sur mia ŝultro aŭ kapo, do mi ĉiam devas porti arakidojn en la poŝo por disdoni al tiuj sentimaj birdetoj, kiuj pensas, ke ĉiu homo portas arakidojn por disdoni al ili. Miaj geamikoj scias pri la agoj de miaj birdetoj, sed kiam fremdulo eliras de sia aŭto kaj nigrakapa paruo ĉirkaŭflugas lian kapon, li opinias ke la birdeto atakas lin. Mi multe ridas pro la surprizo de tiuj kompatindaj homoj kiuj opinias, ke la etaj birdoj volas dolorigi ilin. Do, se vi iam deziras malsovaĝigi nigrakapajn paruojn, estas facile – nur donu al ili krudajn arakidojn kaj vi ĉiam havos birdamikojn kiuj flugos al via mano ... kaj, se vi iam vizitos min, memoru ke eble birdeto *atakos* vin.



— Kim Keeble